AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la aŭstria Esperanto-movado
Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno XV, Fünfhausgasse 16, Austrio. — Telefono R 33-3-64

8a jaro SEPTEMBRO/OKTOBRO 1953 n-roj 9/10

AGADJARO 1953/1954:
50-Jar-Jubileo de la aûstria Esperanto - Movado.

Se la jaro 1905 pro la en Bulonjo-sur maro (Boulogne sur mer) - Francio - okazinta "I-a Universala Kongreso de Esperanto" fariĝis mejloŝtono de nia movado, tiam ni en Aûstrio povas konsideri la antaŭan (1904) jaron kiel la komencon de la aûstria (tiama aûstro-hungara) Esperanto-movado.

La projekto de aranĝota unua granda, internacia manifestacio, vokis la gesamideanojn de ĉiuj landoj al unuecigo kaj agordigo de iliaj landaj Esp.societoj,kaj kluboj.

En nia tiama german-aûstria regna teritorio estis la ĉefaj pioniroj profesoro S i m o n kaj redakt.S c h r ö d e r, kiuj kiel plej aktivaj propagandistoj kaj instruistoj kun pluaj aliaj fervoruloj metis la bazon por lokaj kaj landaj organizoj.

Aûstrio (Aûstro-hungario) estis jam tiam fekunda grundo por helplingvaj problemoj kaj solvoj; ĉar ŝtato kies enloĝantaro apartenis al pli ol 15 diverslingvaj popoloj havis ja la plej bonan premison kaj grandan intereson por interliganta, intergenta lingvo. Ne estas tiel mirige, ke jam la Volapüka lingvo je komenco de la nuna jarcento havis en ĉiuj pli gravaj urboj de la aûstro-hungara imperio fervorajn adeptojn. Post la apero de la Zamenhofa lingvo ili transiris al Esperanto kaj fervore ili varbis por nia lingvo, propagandis ĝin en ĉiuj medioj kaj instruis ĝin en multaj kursoj kaj studrondoj kaj aplikis Esperanton en dekoj da kluboj.

De ĉi tiu jaro ĝis nun pasis jam duon-jarcento; sen ĉeso, eĉ dum la unua mondmilito kaj dum la okupaciaj jaroj ne estigiĝis la verdflama fajro por nia lingvo kaj

por ĝia kultura ideo.

Centoj da, plej ofte jam forgesitaj, fervoruloj gardis la ideon de komuna internacia lingvo por transdoni al ni la genian kaj unikan verkon de la plej granda filantropo de la novepoko, kune kun la tasko ĝin flegi,ĝin disvastigi kaj tiel kontribui ankaŭ niajn oferojn al afero, kiu spite ĉia, ankoraŭ nun ekzistanta, kontraŭstaro devos fariĝi propraĵo de ĉiu kultur-homo.

En ne tre malproksima tempo ni aŭstriaj Esperantistoj volas festi la jubilean datrevenon de la ekestiĝo de nia movado kaj honore memori niajn unuajn pionirojn.

Jam nun petas la estraro de la "Aŭstria Esperantista Federacio" vian kunlaboron por ĉi tiu festo, kiu estos aranĝota en kadro de Jubilea Aŭstria Esperanto-Kongreso. Alsendu proponojn kaj sugestojn, kontribuu mondonacojn por ebligi prepari indan jubilean manifestacion,kiun certe partoprenos multaj aŭtoritatuloj de nia lando,kiuj jam tiom ofte pruvis siajn simpatiojn kaj akcelojn al ni aj lingvojkaj movado. -e-

AŬSTRIA ESPERANTO-INSTITUTO.

La 30an de Sept. komencis la A.E.-I. sian novan agadsezonon. (Estraro: dir.s-ano dro Grimme, sekr.s-ano Werner, protok.s-anino Feichtinger). En la unua kunsido raportis s-anoj prof.dro Sirk kaj Werner pri la kunveno de la "Esp.-Akademio" dum la "38-a"; s-ano dro Grimme pri la unua volumo de la "Aŭstria Antologio" kaj alvokis al akcelo de la disvendo kaj al daŭrigo - preparo de la dua volumo. S-anino Feichtinger prezentis novajn tradukaĵojn de poemoj de modernaj aŭstriaj poetoj.

Verkemaj, lingvospertaj ges-anoj anoncu vian kunlaboron : A.E.-I., Wien XV., Fünfhausg. 16 - kunvenoj okazas ĉiun kvaran merkredon de la monato en la Esperanto-Centro.

SKOLTA ESPERANTO LIGO.

S-ano dro Adolf H a l b e d l - Knittelfeld sciigis, ke li en kunvenoj de la "VIa A.E.Kgr"-Klagenfurt kaj de la "IXa Intern.Kongr.de la Esp.Junular-Organizo" - Wörgl faris raportojn pri"S.E.L.". Ĉi-koncernaj sciigoj mankis en A.E.R.-VIII/53. Ni pri ĉi tio informas nian s-anaron kaj invitas niajn skoltajn anojn kontaktigi kun s-ano dro Halbedl, kiel nia landa S.E.L.-reprezentanto. La red.

Vienaj samideanoj atentu!

I N V I T O

a l

V I E N A E S P E R A N T O - T A G O

okazonta

dimanĉe la 25-an de Oktobro 1953

je 16-a h en Cafe-Restaurant TIVOLI

W i e n XII.,Tivolig.-Tramoj : L, 63

Programo: Kongr-Raportoj, Alparoloj

Recitaĵoj kaj bonhumoraĵoj.

-.-.-.-

A. E. F. - e s t r a r o .

Unua estrar-kunsido okazis la 16.9. Post raportoj pri la VIa A.E.Kgr kaj la ĝeneral-kunveno, esprimis la prez. s-ano dir.Glüxmann sian bedaûron, ke pro la posttagmeza forveturo de la partoprenantoj al la "38a" la traktado de la Ĝ. - K. devis esti mallongigita kaj pluraj aferoj nur povis esti rapide deciditaj. Al la aranĝantoj de nia"VI-a" samideanan koran dankon.Estis konstatita ke la novaj kotizoj (monate po ano S 2.-)validas ekde Jan.1954 kaj la societ (grüp)-kasistoj estas petaj, kiom eble plej baldaû ensendi la deciditan UEA-asocian kotizon de S 1.50 po ano por 1953. Por festi la "Jubilean agadjaron de la aûstria E-Movado" estos printempe 1954 aranĝata en Vieno "Jubilea AEF-Kongreso".Proponoj kaj sugestoj estas petataj. La honor-prezidantoj de AEF estas petataj plue akceli nian federacion. La nova AEF - estraro konsistas el la prezidantaro (dir.Glüxmann, ofickons. Cech, min.kons. dro Führing, sen.kons.dro Grimme, dir.L.Schmid-Klagenft, Maria Loibel,A.Berdan) kaj la komitato(la ceteraj,en la ĝeneralkunveno elektitaj ges-anoj). La AEF-landestroj k. la societestraroj estas alvokataj al pli intensiva kunlaboro kun la AEF-estraro, al regula alsendo de raportoj por la A.E.Revuo kaj de detalaj sciigoj pri vizitoj de eksterlandaj ges-anoj. La enkasigo de la restantaj AEF-kotizoj por 1953 estas urĝe necesa kaj la ensendo de la al AEF apartenanta kotiz-parto petata.

AÛSTRIA ESPERANTO-INSTITUTO

La 30an de Sept.okazis la unua kunsido en la nova agadjaro. La estraro de A.E.-I.(dir.:dro Grimme,sekret.E.

Werner, prot.:s-ino Feichtinger) raportis pri la kunsido de la "Esp.-Akademio" dum la "38a" kaj pri la eldono de la unua volumo de la AÛSTRIA ANTOLOGIO. La aûstria samideanaro estas invitata plej baldaŭ ĝin akiri por prepari La eldonon de 2a volumo. Lingvospertaj kaj verkemaj ges-anoj estas petaj aliĝi kaj kunlabori. A. E. I.- kunsidoj okazas ĉiun 4-an merkredon de la monato je 17.30 h en la viena Esperanto-Centro, Wien XV., Fünfhausgasse 16-18.

AÛSTRIAJ RADIO-DISSENDOJ:

Ĉiu-lunde: Ravag-Wien I je 22.35 - 22.4o - Novaĵoj el Aûstrio
NOVE: Ĉiun duan merkredon (4.XI.,18.XI. ktp) : Ravag-Wien I je: 16.30 - 16.40 - Informoj.
Bonvolu aûskulti kaj atentigu viajn eksterlandajn korespondantojn; ili skribu al Ravag, Wien IV,Argentinierstr.

A Û S T R I A E S P E R A N T O - K R O N I K O

KARINTIO - Klagenfurt : E.S."Paco" aranĝis la 2.9.kunvenon, kiun ĉeestis ges-anoj Cech kaj s-anino Cipera el Vieno.Dum la somero vizitis pli ol 80 s-anoj el 9 landoj kaj norvega karavano la urbon.Post la sukcesplena kongreso preparas la grupo Esp.-kurson. La soc. - adreso estas ĉe sekr. Karl Dürrschmid, Klagenfurt,Sternallee 5.
SALZBURG : E. S. "Verda Stelo" informas, ke ĝia longjara estro,s-ano dir.Fr.Fötinger,kaûze de grava malsano remetis sian funkcion kaj eksiĝis. La nova societa adreso estas tiu de la vicprezidanto, s-ano Hans H ö r t e n h u b e r, Salzburg-Lehen, Raschenbergstraße 25.
STIRIO - Graz : E.S."Unueco", kunvenoj ĉiu-vendrede je 20a h en Steierm. Weinstube, Steinzerhofgasse. La 2an de Okt.okazis publika varbparolado.E-Kurso komencis la 9.9en Arbeiterkammer; konversacian kurson gvidas s-o prof. Hainschegg. La 23.10. kaj 20.11.okazos monatkunvenoj, dum kiuj la societestro s-ano Eder raportos pri la E-kongresoj en Klagenfurt kaj Zagreb,resp.pri la "Internacia ĝardenkultura ekspozicio" en Hamburg.La 5.X.parolis s-ano prof.Hainschegg per Radio Graz pri "Ein wichtiges Mittel zur Verwirklichung der übernationalen Gemeinschaft", laû manuskripto de s-ano Eder, invitante al vizito de kurso en popolaltlernejo; ĉi-radio-dissendon ebligis la kultur-referento de la laborista ĉambro,s-o

dro Scheucher. La stirian Esp.-gazetservon estras s-ano dro Oskar Meister.

TIROLO - Innsbruck : La E.Klubo aranĝis la 19an de Sept. honore al la antaŭ mallonge mortinta tirola Esp.-pioniro kaj kluba honormembro Josef B a u e r memorkunvenon, kiun ankaŭ la familianoj partoprenis. El detala raporto pri la multnombraj vizitoj de eksterlandaj Esp-istoj en la pasintaj somer-monatoj ni koncize sciigas, ke la klubo akceptis opajn ges-anojn el Anglio, Belgio, Danio, Germanio, Nederlando kaj Skotlando, plue aŭtobus-karavanoj belga, danaj, franca, norvega kaj sveda travojaĝe alvenis kaj estis de la klubanoj gvidataj tra Innsbruck kaj ĝia bela ĉirkaŭaĵo.

WIEN : "Danubio", la 7. 9. raportis la ges-anoj Loibel pri la "38a Univ.Kongr.d.Esp." en Zagreb. La kunvenon ĉeestis ankaŭ gastoj el pluraj vienaj Esp.-grupoj. S-anoj dro Grimme kaj Pachmann aldonis interesajn vojaĝ-impresojn; s-ano Mudrak parolis pri sia vojaĝo al la "24a Intern.Katol.E-Kgr.". Ekde la 18a de Okt. okazas la soci-et-kunvenoj ree ĉiun unuan kaj trian DIMANĈON de la monato je 10a atm en gastejo Bauer, VII, Sigmundgasse 14.

"Harmonio", kunvenoj ĉiu-vendrede je 19a en la E-Cen - tro(XV., Fünfhausg.16)- Paroladoj-konversacioj-biblioteko Novaj kursoj (por komancantoj:s-ano G.Loibel; perfektiga dir.Menacher).

"Laboro", kunvenoj ĉiu-ĵaŭde je 19a en la popolkleriga altlernejo, XVIII., Schopenhauerg.49. Ges-anoj H.Kraus kaj R.Novaček aranĝis tutsemajnan E-ekspezicion en la popol-kleriga domo Alsergrund, por atentigi al aranĝota kurso.

"Konkordo". Kunvenoj okazas ĉiun mardon je 19a en kafejo "Annahof", X., Tolbuchinstr.16. Okazas paroladoj laŭtlegoj kaj konversacio.

"Verda Stelo" - kunvenoj ĉiu-lunde je 19a h en la popol-kleriga domo, V., Stöberg.11. paroladoj, konversacio, laŭtlegoj kaj bibliotheko.

Gr."Kagran"-kunvenoj ĉiun unuan mardon de la monato je 19a en gastejo Partik, XXI., Donaufelderstr. 263. Okazas paroladoj kaj konversacioj.

Instruista Esp.Societo - kunvenoj ĉiun 4an lundon de la monato en la Esp.-Centro je 17a h. La soc-estraro prez.s-ano dir.Menacher, sekr.s-ano L.Gschanes, ripetas la

inviton al s-anoj-gekolegoj al anigo kaj al kunlaboro kaj petas je alsendo de sciigoj pri instruado de E-o.

Naturamika Fakgr.:Kunvenoj marde je 19a en Nat.Amika domo,XV.,Diefenbachg.36.La fgr-estro,s-ano Finkenzeller,partoprenis la N.A.kongreson 1953 en Innsbruck. Okazis fakkunveno,ĝin partoprenis 19 gek-doj el 5 landoj kaj la redaktoro de la intern.nat-amika bulteno George kiu, kvankam ne-Esp-isto, kun intereso sekvis la viglajn plurhorajn diskutojn. La decidita rezolucio estis de belga samideano-delegito prezentita al la ĉefkunveno kaj subtenita de la prezidanto de la centra intern.N.-A.-organizo, s-o Moser-Svislando kaj ankaŭ akceptita.Interesas,ke la titolpaĝo de la 3-a n-ro de la E-lingva N.-A.-organo, "La Migranto" estis reproduktita en japana E-Revuo.A.E.F. gratulas al la sukceso de la N.A.E.-Fgr.

Viena Pacrondo Esperantista : kunveno merkrede la 28.X., je 19.30 en E-Centro-Wien XV. Prelego kaj debato pri la temoj: Ĉu la nuna generacio devas travivi trian mondmiliton-.Kian taskon havas Esp-o en la internacia mondpacmovado.

Viena Esperanto-Delegitaro: VED-kunvenoj okazas ĉiun 1-an merkr.de la monato en la E-Centro.La vienaj grupoj kaj fakgrupoj nepre delegu 2 ges-anojn kiel delegitojn, kiuj raportu pri la grupa agado kaj transdonu proponojn. Telefon-posedantoj anoncu sian Esp-istecon al la redakcio de la tel-libro.Grupoj estas petataj kontribui donacojn por pretigo de poŝtejaj inform-tabuloj.

R e c e n z o .

"LETERO EL LA TRANSCENDO" de A.B.Krempel.
El la germana originalo "Brief aus dem Jenseits" modele tradukis kun eklezia prespermeso Maximilian Wielert;aperis en eldonejo "Limburger Vereinsdruckerei GmbH,Limburg Germanio. 35 paĝoj, 12.3 x 19 cm, prezo DM 1.2o plus 10% sendkostoj. Stilo kaj lingvo laŭfundamentaj,Zamenhofaj. Temas pri skribaĵo,trovita ĉe mortinta juna monahino pri ties "maldorm-songo" kun kvazaŭ mistika enhavo - fiktiva "letero el infero" - ĉiuokaze interesa kaj signifa laŭ religia, psikolia kaj teologia vidpunktoj, precipe por kristanaj kreduloj, sed same valora kaj leginda laŭ lingva konsidero.

C.G. kaj W.M.

Hermann von Gilm (1812-1864)

ALLERSEELEN - ĈIUJ ANIMOJ

Stell' auf den Tisch die duftenden Reseden,
die letzten roten Astern trag herbei .....

Rezedon surtabligu, bonodoran,
asterojn lastajn ruĝajn portu kaj
ni rememoru nian amon koran
de l' bela Maj'.

La manon donu, mi ĝin premu varme,
se iu vidos, ja negravas kaj
rigardu min nun kiel iam ĉarme
en bela Maj'.

Hodiaŭ ĉiu tomb' odoru, floru,
mortintoj havu unu tagon kaj
al koro venu, ke mi vin adoru
kiel en Maj'.

Tradukis Jenny Weleminsky.

Jen : Legoprovo el la "AŬSTRIA ANTOLOGIO" - Ĵus aperis la 1-a volumo, eldonita de "Tramondo" - Aŭstria Esp.-Instituto .....
Ĉu vi volas, ke la "Aŭstria Esperanto-Instituto" daŭrigu siajn laborojn por la A ŭ s t r i a A n t o l o g i o ? Do zorgu,ke la eldonkvanto de la unua volumo baldaŭ el-ĉerpiĝu..
Ĉu vi jam mem posedas ĝin? Poste donacu plua(j)n ekzem-plero(j)n al konato(j) de vi. Ĝi estas bela kaj valora donaco kaj - ĉar ĝi estas dulingva - bona propagandilo.

K a t o l i k a E s p e r a n t i s t a V i v o.

AKLE/Leteradr.: W.Mudrak, Wien 3, Beatrixg.19/9=kunvenas en Wien I., Graben 13/25(Kreuzbundheim),ĉiun 2an kaj 4an mardon de la monato de 17 - 19a h.
Kurso por komencantoj samloke ĉiu-marde 19.15 - 20.30 h.
La XXIVa Intern. Kongreso de Katolikaj Esperantistoj en Lourdes estis,malgraŭ ĝenerala striko de la francaj fer-

vojistoj, bela kaj entuasmiga elmontro de la vigleco de nia movado kaj de la amikeco,kiu super la landlimoj unuigas ĉiujn gesamideanojn. De 12a ĝis 16a de Aug. okazis s.mesoj kun E.-prediko, partopreno ĉe la oficialaj pilgrimaj aranĝoj en la mondfama gracloko,laborkunsidoj ktp.

Inter la 60 tamen venintaj ges-anoj estis Pastro prof. Beckers (Belg.),prezid.de IKUE,Pastro M.Carolfi (Italio) Pastro Thalmair (Germ.) kaj F-ino Boedec (Francujo).

Nia ĉefepiskopo Viena, kardinalo dro Th.Innitzer,sendis specialan signifan salutleteron al la kongreso, kie i.a. estas esprimite : "....Vi elektis tiel belan preĝintencon kiel temon de via kongreso "La universaleco de la eklezio kaj paco"; tio ja estas la kor-afero de ĉiu vera katoliko, ke en la regno de Kristo,en la sankta katolika eklezio, do ankaŭ en la mondo regu la PACO de KRISTO! Vi,katolikaj Esp-istoj, faras por tiu celo praktikan laboron per la unuiganta ligilo de la komuna lingvo, kiel ankaŭ per via gazetaro kaj via korespondado de homo al homo, trans ĉiujn limojn de landoj kaj lingvoj. Jen vi estas pioniroj kaj veraj akcelantoj de la paco.." (Laŭ germanlingva originalo) W.M.

Gazetaro :"Wr.Kirchenblatt"-26.7.;"Volksbote"-Innsbruck-19.7.; "Offenes Wort" - 19.7. pri IKUE-Kongr.en Lourdes; "Rupertibote"-Salzburg-23.8.pri Diservo en Wörgl;"Klein. Volksblatt"-26.7.pri A.E.Kgr.Klagenfurt kaj IKUE-Kongr., -8.8. pri "38a U.E.Kgr. en Zagreb" ktp.

NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO.

Helsingör-Danio : La ĉi-jara "Intern.Ferio-Kurso okazis de la 18a - 25a de Julio. Lisboa - Portugalio : La loka ĉefa gazeto "Republica" enhavis regulan ampleksan Esp.-kronikon. Gressilon-Francio : Internacia Kultura Semajno okazis de la 3a- 10a de Aug.en la tiea "Kultura Esp-Domo Konstanz-Germanio: "2a Intern. Ferio Semajno de 18a-24a de Julio; okazis inaŭguro de "Zamenhof-Strato". Barcelona-Hispanio : Esp-semajno kun ekspozicio rezultis bonvizititan kurson. Buenos Aires-Argentinio: La granda ilustrita revuo "Vea y Lea" aperigis 2 paĝan artikolon de Alberto Reyna sub titolo "Esperanto,universala helpa lingvo, povas atingi la miraklon pri la interkompreno kaj la unuigo inter la popoloj". London-Anglio : E-kursoj en la

North London Literary Institute: Informa Centro malfermita en London N 19, 247 Juncion Road. Ilford-Anglio : E.-kurso en la Contry High School for Girls. Sao Paulo-Brazilo: La "Instituto de Alfabetizacao para Cegos" eldonis brajlan E-kurson por blinduloj. Milano-Italio:La urbmagistrato subvenciis la lokan E.-soc. per 50.000 liroj. St.Etienne-Francio : La "Manifacture Francaise d'Armes et Cycles" eldonis E-lingvan katalogon de siaj produktaĵoj. Kyusyu-Japanio : La profesoroj de la tiea Universitato decidis publikigi E-lingvajn resumojn de siaj matematikaj verkoj. Taegu-Koreo : En la Chunggu-Universitato partoprenis 260 gestudentoj E-kursojn;ili petas je alsendo de E-libroj. Maribor-Jugoslavio : Okaze de propagandvojaĝo parolis s-ano M. Stuttard (UEA-estrarano) pri la signifo kaj celoj de universalaj E-kongresoj. Ateno-Grekio:S-ano prof.dro A. Stamatiades raportis, ke li en la agadsezono 1942/53 instruis E-on en 14 ŝtataj gimnasioj, en komerca kaj pedagogia akademioj kaj en altlernejoj por ekonomiaj kaj instruaj sciencoj; partoprenis 1244 personoj.Utrecht-Nederlando : En Majo okazis tie la "5a Fervojista E-Kongreso"; partoprenis 400 ges-anoj el 12 landoj.Antwerpen-Belgio: En printempo estis aranĝita 1-a Beneluksa Esperanto- Kongreso"; ĉeestis 300 ges-anoj el Belgio, Ne - derlando kaj Luksemburgo. La landaj E -organizoj aranĝis siajn jar-kunvenojn. Montevideo-Urugvajo : antaŭ monatoj okazis bone sukcesinta E-ekspozicio.Oni jam nun preparas tie pli ampleksan ekspozicion,aranĝotan okaze de la UNESKO-konferenco.1954. Lund-Svedio : prof.S.Svensson aperigis en E-gazetoj enketon pri uzo de ĉevalviando kiel untraĵo.Alveno 90 leteroj el 35 landoj(de Aŭstrio el Graz)

A.E.F. kvitancas danke jenajn mondonacojn:

Pac-rondo St. Pölten : S 50.--; A.E.Kongr.-Klagenfurt : S 250.--; Instruista Soc. : 100.--; entute S 400.--
Plue por AEF-Presilo-3a listo:A.E.Kgr.-Klagenfurt:S 250.-
E.Kl.Innsbruck: S 93.-; Katol.Gr.Wien:S 70.-; Gr.Wattens: S 60.-;s-o Bogenberger,Graz:S 20.-; s-o Maidorfer- Landeck: S 15.-;s-ano Regensberger, Landeck k.s-ino Löffler-Wien po S 10.-; s-anino Heilinger, Graz k.s-o Grünberger, Wien po S 5.-; s-ino Schreiber,Wien S 2.50,s-ino Leser - Wien S 2.--. Entute S 2.479.25

G r a v a a l v o k o !

Nia honor-prezidanto, s-o ĝeneral-poŝtdirektoro, sekc. ĉefo dro K. D w o r s c h a k, konsentis la fiksigon de "Inform-tabuloj" en poŝtoficejoj en lokoj, kie troviĝas inform-pretaj kaj lingvospertaj samidean(in)oj. La centra A.E.F.-estraro tial petas servemajn samideanojn, ke ili tuj sciigu siajn adresojn al la A.E.F.-Centro, Wien XV., Fünfhausg. 16. La Esp.-societoj, kluboj kaj grupoj samcele alsendu siajn aktualajn societ-aŭ korespondadresojn kaj plue adresojn de samideanoj en najbaraj lokoj, kiuj estos de la AEF invitatoj konsenti doni Esperanto- kaj fremdul-trafikajn informojn. Samideanoj en lokoj, en kiu troviĝas pluraj poŝtoficejoj estas petataj sciigi al la centro la nombron kaj la adresojn de la poŝtoficejoj. Pro la graveco de ĉi tiu evento estas atendata,ke ĉiu konscia samidean(in)o sin senprokraste anoncas!

Kunlaboru en fakaj Esp-organizoj!

Konsciante,ke fakaj Esperanto-organizoj per sia praktika apliko kaj uzo de nia lingvo grave akcelas la disvastigon kaj taŭgecon de Esperanto, la centra estraro de A.E.F. invitas ĉiujn siajn anojn partopreni la fakan Esp.- movadon kaj sciigas ĉi - sube la adresojn de niaj aŭstriaj Esperanto-fakgrupoj :

Aŭstria Instruista Esp.-Societo:Wien VX.,Fünfhausg.16-18 Aŭstria Katolika Ligo Esp-a:s-ano W.Mudrak,III.,Beatrixgasse 19/9;Fervojista Esp.-Fakgrupo, Linz, Bahnhofstr.3; Naturamika E-Fakgrupo: Wien XV.,Diefenbachg.36; Poŝtista Esp.-Societo,I.,Postgasse 8/345;Aŭstria Socialista Ligo: Esperantista: Wien XV., Fünfhausg. 16.

Aldone la adresoj de reprezentantoj de INTERNACIAJ ESPERANTO - ORGANIZOJ (Petu de ili detalajn informojn!):

Universala Esperanto Asocio: ĉefdelegito Mag. F.Höfert, Wien XIV., Penzingerstr.121; Sennacieca Asocio Tutmonda: ĉefperanto dro Ant. Karner, Stams, Tirol; Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista: W.Mudrak, Wien III.,Beatrixgasse 19/9; Universala Ligo: Hans Steiner, Wörgl,Aug.42, Tirol; Skolta Ligo Esperantista:dro Ad.Halbedl, Knittelfeld, Schmittg.,Stirio;Internacia Scienca Asocio Esperantista: dro H.Sirk,Wien III.,Baumg.26; Internacia Fervojista Esperanto-Federacio:Josef Zink,Wien X.,Ecconomog.33

26a S.A.T. - Kongreso.

En la tagoj de la 2a ĝis 8a de Aŭg. kongresis la anoj de S.A.T. en la laborista hejmo en kastelo Wortley Hall apud la konata industria urbo Sheffield-Anglio. Spite,ke la kongresurbo estis tre fora de centra Eŭropo aliĝis el 14 landoj 239 gekameradoj kaj partoprenis la kongreson 185 ges-anoj el 8 landoj.

La publika kongres-kunveno okazis antaŭ la kastelo, ĉeestis vicurbestro de la najbara urbo Barnsley. La Nacia Konsilantaro de Labor-kolegioj forte akcelis la aranĝon kaj eĉ funkciigis E-an korespondan kurson. Krom 3 labor-kunsidoj kaj ekskursoj al Barnley kaj Rotherham kaj en la proksiman montarregionon estis aranĝita interesa demandvespero en kiu 4 kompetentaj britaj k-doj lerte respondis al la skribe faritaj demandoj.

La gvidrezolucio enhavis interalie la tekston, "ke le praktikado de Esp-o por konkretaj taskoj kaj celoj estas la plej bona pruvilo pri la fakta valoro de Esperanto, sekve la plej taŭga maniero de propagando".

FERVOJISTA ESP.-FAKGRUPO.

La centro de la F.E.-Fgr. en Linz (Bahnhofstr.3) sendis detalan raporton pri la "fervojista Feria Semajno", okazinta la 6an - 13an de Sept. en Bad Ischl.El la interesa raporto ni koncize citas, ke la sukcesan aranĝon, kiu estis de bela vetero favorata partoprenis 60ges-anoj inter ili la prezidanto de I.F.E.F. s-ano Stapel el Nederlando, kiu kiel ankaŭ la la francaj kolegoj Petit kaj Coyac kondukis karavanon al la F.E.-S.

La estro de la Fgr. bonvenis la gastojn kaj sciigis,ke la aranĝaĵo estis inicita des s-ano Angermayr; lin helpis la s-anoj Binder, Geroldinger, Stöckl, Huber, Bürger kaj la staciestro s-o Roithinger. Ili ankaŭ funkciis kiel gvidantoj ĉe diversaj ekskursoj tra la unike bela Salzkammergut. Nome de la fervoja direkcio salutparolis s-ano central-inspektoro Steindl. Speciale plaĉis al la partoprenantoj la folklora vespero.La aranĝon partoprenis ankaŭ s-ano Hofrat Steiner, emer. fervoj-oficisto, kiu dum la adiaŭ vespero parolis pri la "Intern.Esp.-Muzeo."

La centra estraro de A.E.F. dankas al la iniciatanto kaj aranaĝantoj kaj gratulas al la Fervojista E-Fakgrupo al bona sukceso.

Vbb.
(Zl. 3216/47)

Josef Schraml
Scherfenbergerstr. 15
Linz/Donau

"T R A M O N D O" o f e r t a s !

A û s t r i a A n t o l o g i o	S 7.--
F i n g r u l i n o	" 8.--
Wörterbuch Deutsch-Esperanto	" 2o.--
Wörterbuch Esperanto-Deutsch	" 7.--
Für Kursteilnehmer beide zusammen	" 2o.--
Senhalte al celo	" 3.5o
Tri Majstronoveloj	" 3.--
"Mortado" de Nothnagel	" 3.--
Vienaj Legendoj	" 2.5o
La Mondopaco	" 2.--
Kantaro	" 2.--
Junaĝo	" 1.--
La Kvar Paĝoj	" 1.--
Freude durch Esperanto (Lehrbuch)	" 5.--
Brikisto: Lehrbuch des Esperanto	" 1o.--
Esp.-Leitfaden von H.Königstedt	" 6.--
Mair: Pri la prepozicioj	" 3.--
Einzelstücke-unikaĵoj:	
Esperanto - Mittler der Weltliteratur (Oeste)	" 24.--
Ce sankta akvoj (Heer)	" 45.--
Leteroj de Zamenhof, 2 volumoj po	" 59.--
Leteroj de Lanti	" 34.--
Du amosentaj noveloj (Storm-Ebner-Eschenbach)	" 11.--
Pensoj de Zamenhof(angle,france,germane Esp-e)	4.5o
La dektri mortis	" 3o.--
Invito al la ĉielo	" 18.--
Esp.-Insignoj (pinglo-broĉo)	" 4.--
Esp.-Glumarkoj (18 pec.)	" 1.--

Ĉiu german-lingva libro estas je originala prezo mendebla per de la Esp.- librovendejo "TRAMONDO"-Wien XV., Fünfhausgasse 16-18 (Tel.R.33.3.64) - Esperanto-Centro

Eigentümer und Herausgeber: Österr.Esperantisten Verband
Verlag : "Tramondo", - Verantwortlicher Redakteur : Hugo
Kraus, sämtliche W i e n XV., Fünfhausg.16;Druck:Offset-
Vervielfältigung ADRESSEN-SUPPAN, Wien IV.,Brucknerstr.2